

# Kia Maniere Naskiĝi Denove?

Wayne B. Illes (Kanado)

Ofte ni aŭdas pri personoj kiuj diras ke ili "naskiĝis denove." Ni ĉiuj pekas, kaj loĝas en mondo plene da pekoj, sed kia maniere ni povas scii ĉu iu vere naskiĝis denove?

La sanktaj skriboj diras al ni la maniero naskiĝi denove. La plej granda ekzemplo estis kiam Jesuo diris ke ni "devu naskiĝi de akvo kaj de la spirito" (Johano 3:5) (naskiĝi de akvo estas la baptingo, naskiĝi de la spirito estas la ricevo de la Sankta Spirito).

Kiam ni naskiĝas denove, estas kelkaj evidentaj rezultoj:

Mosia tre bone eksplikis kio okazas (en la Libro de Mormono) rilate al tiu ĉi temo; (Mosia 4,5)

1. Estas granda ŝanĝo en nia koro, t.e. ni ŝanĝas nian direkton.
2. Ni ne volas fari ion malbonan, nur bonaĵojn.
3. Ni havas vidon de la regno (la profetaĵoj, kaj kompreno de la plano de Dio).
4. Ni deziras interkonsenti kun la Sinjoro (promesi al li); obei la diajn ordonojn, fari interkonsentojn ĉe nia baptingo, kaj kiam ni partoprenas la Eŭkaristion.
5. Ni spirite iĝas idoj adoptataj de Kristo.  
Ni havas 3 patrojn: 1) Nia tera patro, li, kiu donis korpon al ni; 2) Dio, la patro de niaj spiritoj (Hebreoj 12:9); kaj 3) Kristo, la patro de la eterna vivo.

En Galatoj 4:1-6, ĝi diras ke la heredanto ne estas pli bona ol la servisto ĝis kiam li povas diri "Abba" (mia patro) en lia koro. La heredanto estas membro de la Eklezio de Kristo, kaj la servisto, la ne-membro.

La membro de la Eklezio estas la sama ol la nemembro ĝis kiam li rekonas ke Dio estas lia patro.

Ni, gefratoj, estas membroj de la vera Eklezio de Kristo, sed ne nur pro tio ni atingos la Ĉielan Regnon. Ni ne havas tiun eblecon ĝis kiam ni povas entute akcepti Kriston en nia koro. Ni jam estas en la vojo ĝis la eterna vivo, kompreneble, sed la baptingo kaj la ricevo de la Sankta Spirito ne estas ĉio! Estas nur la malfermiĝo de la pordo.

Ni devas sekvi la vojon, farante tion, kion la Sinjoro diris: "Se vi min amas, obeu miajn ordonojn." (Johano 14:15). Estas grava obei la ordonojn de Dio, ĉar "la fido sen agoj estas

morta." (Jakobo 2:20).

Se ni amas la Sinjoron, kaj se ni vere naskiĝis denove, ni obeos la ordonojn de Dio. Ne sufiĉas nur diri "mi naskiĝis denove," iu ajn persono povas tion diri, kaj estas multaj personoj en la mondo kiuj kredas ke ili naskiĝis denove, sed kiuj estas pli malproksimaj al la vojo al la eterna vivo ol tiuj kiuj neniam tion diris. (Mateo 7:21-23).

### **Kia Maniere Ni Scias Ke Ni Naskiĝis Denove**

Mosia diris ke ni pleniĝos de ĝojo kaj ni havos pacon en nia konscienco. Sed ĉu estas personoj kiuj naskiĝis denove, kaj ne scias tion? Jes (Vidu 3 Nifai 3:20-21), (ankaŭ 2 Nifai 31:17, Moroni 6:4, 8:25-26).

Ĉiuj povas ricevi ateston kaj senti la povon de la Sankta Spirito, sed tio plurfoje okazas post la baptiĝo en la Eklezio de Jesuo Kristo.

Kia Maniere Resti "Naskita Denove"?

1. Ami Dion: Se ni amas lin, ni obeos ĉiujn ordonojn. (Mateo 23:37).
2. Ami nian kunulon: Se ni amas nian kunulon, ni ankaŭ amas Dion. - Kiam ni servas niajn kunulojn, ni servas Dion, pere de nia agado. (Mateo 23:39).
  - a) Servi kaj ami al niaj kunuloj signifas servi al ĉiuj, ne nur al niaj geamikoj, gesamideanoj, aŭ gefratoj de la Eklezio. (Mosia 4:14).
  - b) Ni ankaŭ devas servi al nia familio. (II Kor. 12:14, Efesanoj 5:22, 24, 28, 33).
  - c) Ni servu al almozuloj.

Ni ĉiuj estas almozuloj; ni dependas de Dio por ĉio kion ni havas: nia korpo, la aero, la tero, niaj familioj kaj personaj posedaĵoj, ankaŭ pro la kompenso de Kristo.

Se ni ne havas kun kio helpi al nia kunulo, nia sinteno devus esti, "Se mi havus, mi helpus." Kiam ni havas ion, ni helpu. Kiam ni havas iomete pli ol por nia neceso, ni tiam pli ol iam helpu.

Se ni amas Dion kaj obeas la ordonojn, ni scias ke ni restos "denove naskita" kaj la Spirito de Dio restos kun ni. Ne nur sufiĉas nur kredi, je Dio kaj akcepti al Kristo. Tiuj estas etaj paŝoj.

Naskiĝi denove ne signifas ke vi tuj saviĝos en la Ĉiela Regno. Vi devas daŭre sekvi la vojon ĝis la eterna vivo.